

Friedrich Leopold Stolberg, Graf zu Stolberg-Stolberg,

## Al la naturo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Dolĉa, sankta vi natur',  
Iru mi sur via spur',  
Gvidu min ĉe via man',  
Kvazaŭ estus mi infan'!

Laciĝinte tiam mi  
Sinkas al la brust', al vi,  
Trinkas ĝojon de miel',  
Estas mi en la ĉiel'.

Aĥ! Mi sentas bone min!  
Ĉiam volas ami vin ;  
Iru mi sur via spur',  
Dolĉa, sankta vi natur'!

*Traduko de la Germana poemo "An die Natur" de FRIEDRICH LEOPOLD STOLBERG, GRAF ZU STOLBERG-STOLBERG (\*1750-11-07 - †1819-12-05) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2008-12-11.*

MR-473-01 / Arg-482-936  
(2008-12-12 21:06:50)

*Por tiu ĉi poemo komponis muzikaĵon la germana komponisto Franz Schubert (1797 - 1828). Vidu la retejon [http://www.klassika.info/Komponisten/Schubert/Lied/D\\_372](http://www.klassika.info/Komponisten/Schubert/Lied/D_372).*

Friedrich Leopold Stolberg, Graf zu Stolberg-Stolberg,

## An die Natur

Süße, heilige Natur,  
Lass mich gehn auf deiner Spur,  
Leite mich an deiner Hand,  
Wie ein Kind am Gängelband!

Wenn ich dann ermüdet bin,  
Sink' ich dir am Busen hin,  
Atme süße Himmelslust  
Hangend an der Mutterbrust.

Ach! Wie wohl ist mir bei dir!  
Will dich lieben für und für;  
Lass mich gehn auf deiner Spur,  
Süße, heilige Natur!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas FRIEDRICH LEOPOLD STOLBERG, GRAF ZU STOLBERG-STOLBERG (\*1750-11-07 - †1819-12-05).*

Arg-482-935 (2008-12-12 21:06:02)

*Dies Gedicht ist von dem Komponisten Franz Schubert (1797 - 1828) im Jahre 1816 vertont worden. Siehe [http://www.klassika.info/Komponisten/Schubert/Lied/D\\_372/](http://www.klassika.info/Komponisten/Schubert/Lied/D_372/).*

Friedrich Leopold Stolberg, Graf zu Stolberg-Stolberg,

## Al la naturo

*tradukita de Hans Erik Jensen*

Vi naturo, sankta, kara,  
laŭ la vojo via klara  
gvidu min per via mano,  
estu do al ni ekrano.

Laca, kara amikino,  
kuŝas mi ĉe via sino,  
suĉas ĝojon plej ĉielan,  
lulas min en dorman belan.

Amas mi vin kiel infano,  
iras nur ĉe via mano  
laŭ la vojo via klara,  
vi naturo, sankta, kara!

*Traduko de la Germana poemo "An die Natur" de FRIEDRICH LEOPOLD STOLBERG, GRAF ZU STOLBERG-STOLBERG (\*1750-11-07 - †1819-12-05) en Esperanton de HANS ERIK JENSEN (†1973-06-18).*

Arg-482-937 (2008-12-11 10:21:02)

*Tiu ĉi Esperantigo de la poemo troviĝas en la kantlibro "Esperanto-Sangbogen", eldonita 1941 de Dana Esperanto-Asocio kaj Dansk Esperanto-Selskab, n-ro 27. S-ano Lars Kromann [Stenbrydervej 6, Værløse, DK-4640 Fakse, lars.ev@get2net.de] transprenis ĝin en sian poem- kaj kantkolekton "www.esperantonia.dk". Vidu la retejon <http://www.esperantonia.dk/allanatur.o.htm>.*